

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio, pri la Kongreso de la Asocio por Monda Parlamentejo.

De la 18-a ĝis la 21-a de oktobro okazis en la Domo de la Kongresoj en Ĝenevo granda Asembleo por Monda Parlamentejo.

Estas interese raporti kelkajn dirojn el la paroladoj, kiujn prononcis tie gravaj ministroj.

Nia svisa ministro Wahlen, la estro de la politika Departemento de la svisa Federala Registaro, en sia saluto al tiu Kongreso, priskribis interese la evoluon inter la nacioj. Li observigis, ke se inter la du mondmilitoj la komercaj rilatoj inter la nacioj pli kaj pli difektiĝis, post la dua mondmilito, kontraŭe, naskiĝis inter la nacioj vera monda ekonomia ekkooperado. Hodiaŭ la popoloj tiel proksimiĝis, ke fariĝas necese krei universalan ordon. La vojo, kiu kondukos al tiu idealo estos longa kaj peniga. Oni do estu dankema pro la laboro de Asocio kiel tiu, kiu kongresas en Ĝenevo, ĝi klopodas perfektigi la internaciajn instituciojn. Kiam regos ordo en la mondo, ĉiu nacio povos trankvile vivi sian propran vivon. Sed por tio la internaciaj rilatoj ne plu devos esti bazitaj sur perforto, sed sur internacia juro, kiun devos observi ne nur la malfortuloj, sed ankaŭ la granduloj. Internacia juridikcio, subtenata de internacia polica forto, prizorgos por triumfi tiujn principojn.

Post tiu rapida resumo de la diroj de la reprezentanto de la svisa registaro mi citos kelkajn dirojn de lordo Attlee. La eksĉefministro de Britujo unue montris, ke la svisa federalismo povus alporti receptojn por la konstruo de la monda federalismo. Poste li asertis, ke la du grandaj problemoj hodiaŭ ekzamenendaj estas la malarmado kaj la malsato. Li rememorigis, ke hodiaŭ la homoj disponas pri ĉiuj rimedoj kapablaj savi la mondon de la malsato. Sed necesus elradikigi la kaŭzojn, kiuj kondukas al milito, ĉar la mondo troviĝas antaŭ elekto : ĉu prospero por ĉiuj, ĉu detruo.

Granda specialisto pri la problemoj de la malsato en la mondo, lia moŝto Jozuo de Castro, ambasadoro de Brazilo en Unuiĝinta Naciaro, diris, ke en la atoma erao, kie ni vivas, estas la milito kaj ĝia prestiĝo, kiuj estas la iluzio, dum la paco estas la realaĵo. Sed li avertis, ke la paco devas esti konstruota.

Li tre detale priskribis la nunan mondan situacion : du trionoj de la monda loĝantaro suferas pro malsato, dum la ŝtatoj elspezas po 120 miliardojn da dolaroj jare por pretigi militon, kiu fariĝas neebla, ĉar ĝi kondukus al ĝeneraligita detruo de la homaro.

Por la ambasadoro de Brazilo la atigenda celo estas klara : necesas malarmadi, ĉar la monstraj armiloj kostas multe kaj utilas al nenio, dum monon ni bezonegas por alporti la nepre necesan teknikan helpon al la subevoluintaj landoj. Paco estas necesa por asekuri la postvivon de la homaro. Paco eblas, forigo de malsato ankaŭ eblas. Kio ne eblas, tio estas pretendi daŭrigi la armadkonkurson kaj samtempe voli nutri la ter-loĝantaron.

Ni meditu tiujn tezojn de Jozuo de Castro, kiuj bone priskribas la strangan hodiaŭan situacion.

Multaj aliaj altrangaj personecoj partoprenis tiun Kongreson. Ni citu ankoraŭ lordon Silkin, senatanon Edouard Bonnefous, la eksministron Robert Buron, s-inon Maria Tibaldi-Chiesa, kiu estis deputitino en la itala Parlamentejo, s-ron Jules Moch, eksĉefministro de Francio, kiu hodiaŭ estas specialisto pri la atom-armiloj, s-inon Summerskill, kiu estis ministrino por la socia sekureco en Britujo kaj prezidantino de la brita laborista partio. Ni povus ankoraŭ longe citi nomojn.

Tiu kongreso ricevis mesaĝojn el multaj landoj. Vatikano kaj prezidanto Nehru salutis ĝin. Lordo Home, kiu nun estas la ĉefministro de Britujo ankaŭ skribis sian esperon en ĝi, same

kiel la ĉefministro de Kanado, la prezidanto de Pakistano, la ministro pri eksterlandaj aferoj de Danlando kaj multaj aliaj politikaj altranguloj.

La debatoj pri la temo malarmado kaj malsato en la mondo dum nuklea epoko pruvis plian fojon la neceson alporti al Unuiĝinta Naciaro la necesajn reformojn, kiuj permesus al ĝi ludi la rolon de vera monda registaro.

Kio por multaj personoj ŝajnas eble utopio, tio hodiaŭ fariĝas trankvile realaĵo. Turnu nur la butonon de via radio dum la anonco de novaĵoj kaj kalkulu en procentoj la dirojn, kiuj koncernas la eksterlandon kaj la mondon kun tiuj, kiuj koncernan nur vian nacion. Vi konstatos tiam, ke la mondo vere ekzistas.

Mi instruas infanojn dek- ĝis dek ses-jarajn. Dum la civitana instruado mi ofte konstatis, ke ili estas pli bone informataj pri la mondaj okazaĵoj, ol pri la naciaj. Estas stranga fenomeno, kiu eble anoncas, ke ni troviĝas ĉe la soljo de nova homara periodo. Ni tion esperu, ĉar se dum la fino de nia jarcento la homoj ne estos kapablaj unuiĝi, ili certe pereos en frata stulta lasta konflikto.

Vi aŭdis prelegon pri la Kongreso de la Asocio por Monda Parlamentejo, kiu okazis en Ĝenevo de la 18-a ĝis la 21-a de oktobro.

Nome de Radio-Svislando Claude Gacond diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-